

La rusa kulturo kaj la japana socio

SERGEY ANIKEEV

For-Orienta Ŝtata Universitato

Neniu lando en la mondo povas vivi kaj evolui sen kontaktoj kun siaj najbaroj, sen unuflanka, duflanka aŭ multeflankaj influoj. Japanio ne estas escepto kaj japanoj de pratempoj modernigis sian socian vivon ĉerpante sciojn de la pli alte evoluintaj landoj: de tri antikvaj Koreaj imperioj kiujn sekvis la epoko de Ĉinio.

Ties influoj penetradis al Japanio poimete dum longega tempo. Dank'al tio la alilandaj influoj ne vidiĝis kaj ne estis akceptataj kiel fremdaj por japanoj. Sed post du jarcentoj de la izoleco el eŭropaj landoj kaj Usono ŝtorme invadis fremda kulturo kiu renversis la estadon mem de japanoj.

Japanio speciale koncentriĝis je studoj pri ekonomiaj kaj politikaj sistemoj de tiuj landoj. En tiu ĉi senco tiutempe Rusio ne povis prezenti per si modelon por imitado kaj ne kapablis rivali. Sed la situacio estis tute alia rilate la spiritajn valorojn kaj precipe la kulturan influon de Rusio al Japanio.

Historio de kulturaj rilatoj inter Rusio kaj Japanio komenciĝis de la epoko de Petro La Granda. Sed regulaj kontaktoj establiĝis nur en la dua duono de la 19-a jarcento. Tiamaniere la epoko de la rekta interfluo de kulturoj inter du landoj aĝas iom pli ol 100 jarojn.

En 1868-a jaro la japana registaro komencis modernigon de la socio surbaze de alilandaj spertoj. Sed Rusio en tiu tempo ne rolis kiel modelo por imiti kaj la influo de Rusio por la japana socio estis apenaŭ rimarkebla. Politiko-ekonomiaj ŝanĝoj en Japanio baziĝis sur eŭropa kaj usona spertoj. Tamen en la humanisma sfero Rusio influis multe pli ol aliaj landoj.

Estas konata fakto ke la rusa lingvo komencis disvastiĝi en Japanio samtempe kun la disvastiĝo de la rusa ortodoksa religio ĉekape de la pastro Nikolai kiu estis poste sanktigita kun la nomo Nikolai La Japana.

Komence la rusa ortodoksa religio enradikiĝis en nordaj urboj — Hakodate, Sendai, Morioka, Takashimizu, sed poste ĝi disvastiĝis ankaŭ al sudaj partoj de Japanio. En 1873 la kontraŭkristana leĝo en Japanio estis nuligita kaj komencis kreski kampoj de misiista laboro. En 1875 estis malfermita la ortodoksa teologia seminario (Seikyo singakko). En tiu tempo la pastro Nikolai jam loĝis en Tsukiji en Tokio kaj li okupiĝis multe pri instruado de la rusa lingvo al japanoj, kies nombro ĉirkaŭ li atingis 150 personojn.

Plej multaj baptitaj japanoj iris lerni al Rusio dum Meiji-periodo: en la teologiaj akademioj en Rusio tiam lernis ĉirkaŭ 18 japanoj. Sed poste dum Taisho-periodo vizitoj al Rusio por lerni preskaŭ ĉesis.

Inter japanoj kiuj lernis en la Tokia rusa seminario estis kelkaj kiuj prosperis en siaj ŝtataj oficoj poste. Historiisto Iwama Seiko donis nomojn de kelkaj: Abe Hiroshi estis guberniestro de Tokio, Ando Kensuke estris la urbon Yokohamo, Kato Matsuo atingis altan rangon de ministro, Omae Taizo estis konsilanto ĉe la japana misio en Peterburgo, Sato Shosuke estis prezidanto de Hokkaida universitato, Suzuki Otohei gvidis la ruslingvan fakon de la Tokia fremdlingva lernejo. Alidire, rusaj ortodoksaj lernejoj edukis ne unu generacion de japanoj sciplenaj pri Rusio, la rusaj lingvo kaj kulturo.

Ekzemple, Konishi Masutaro (1862-1940, la rusa baptonomo Daniil Petrovich) post la fino de la seminario en Tokio restis 9 jarojn en Rusio. Li persone konis Leon Tolstoj kaj Konishi poste

skribis rememorojn pri li.

Senuma Kakutaro (Ivan Akimovich) post la fino de la seminario en siaj 30 jaroj fariĝis rektoro de la seminario. Li ankaŭ estis tre fervora adoranto de Leo Tolstoj. Kaj Konishi kaj Senuma tradukis en la japanan lingvon verkojn de Tolstoj kunlaborante kun la fama verkisto Ozaki Koyo.

La fama ruslingvisto Nobori Shomu (1878-1958) ankaŭ estis edukito de la rusa ortodoksa seminario en Tokio, li finis ĝin en 1903. Jam en 1904 li publikigis libron pri rusa verkisto V. Gogol kaj dum sia 80 jara vivo li eldonis tradukojn kaj studo-laborojn pri la rusaj literaturo kaj kulturo kies nombro atingas pli ol 100 volumojn. Nobori Shomu tradukis ne nur verkojn de rusaj klasikuloj, sed ankaŭ verkojn de Averchenko, Arcibashev, Afanasiev, Balmont, Sologub k.a. Li instruis en pluraj lernejoj: en la Teologia Seminario, Milita akademio, Waseda universitato k.a. Li kompilis tre imponan studlaboron "Roshia bungaku to nihon bungaku" (La rusa literaturo kaj la japana), 1953. Per tiu ĉi laboro Nobori Shomu prezentis influojn de rusaj literaturistoj al la japanaj kiel Uchida Roan, Ozaki Koyo, Tokutomi Roka, Tayama Katai, Mori Ogai k.a.

Multaj japanaj verkistoj alte taksis la rusan literaturon. En la vera senco japanoj komencis serioze interesiĝi pri la rusa literaturo en 1888. Tiam la japana verkisto Futabatei Shimei faris profesie lertajn tradukojn de verkoj de Turgenev. La rilatoj de Futabatei Shimei al la rusa literaturo estis tre simbola. Kiam li estis juna knabo li decidis fariĝi soldato por batali kontraŭ rusoj. Tri foje li malsukcesis pasi ekzamenojn ĉe militlernejo kaj tiam li decidis iri sian propran vojon. Li eniris la ruslingvan fakon de la Tokia lernejo de fremdaj lingvoj. Li celis ellerni la lingvon de la ebla estonta malamiko kaj fariĝi militisto-interpretisto. Sed la nomo de Futabatei fariĝis konata ne pro lia militista kariero, sed en la japanan historion li eniris kiel literatur-verkisto. Tian decidan paŝon li faris dank'al la rusa literaturo kiun li tre bone konis kaj lerte tradukis en la japanan.

Dum la japan-rusa milito oni eksentis mankon de interpretistoj de la rusa lingvo. La problemo estis tiom grava ke oni debatis ĝin en la parlamento. Laŭ postulo de la milita ministro Terauchi Masatake en 1896 kursoj de la rusa lingvo malfermiĝis ĉe la Universitato de Sapporo (Rogo gakkai).

Lernante la rusan lingvon studentoj akiris aliron por la vastaj kulturaj kaj humanismaj trezoroj de Rusio. Malfermiĝis novaj horizontoj, malaperis timo antaŭ la granda norda najbaro kaj certgrade limitiĝis militismaj ambicioj. Instruado de la rusa lingvo en tiama Japanio atingis tre altan nivelon. La rusa klasika literaturo de la 19-a jarcento kaj modernaj sociaj pensoj fariĝis havaĵo de generacio de junaj japanoj. Post la fino de la milito estis populara jena diro: "Japanoj venkis rusojn en bataloj sed japanoj mem estis venkitaj de la rusa literaturo".

Kiel jam estas menciite tre gravan laboron faras japanoj-ruslingvistoj. En ĉiuj tempoj sendepende de politika aŭ aliaj cirkonstancoj tradukistoj kaj esploristoj senlace laboras kreante novajn tradukojn, komentariojn, bibliografiojn pri rusaj verkistoj, religiaj kaj kulturaj agantoj.

Ankoraŭ foje mi devas rememori gravan laboron de Futabatei Shimei, ĉar li ne nur tradukis la rusajn literaturajn verkojn sed sukcese tradukis japanajn modernajn verkojn por la rusaj legantoj. Ekzemple en la revuo "Vostok" (Oriento) (ĝi estis eldonata en Yokohamo en la rusa lingvo en 1907-1908) Futabatei aperigis tradukojn de "Maihime" (Dancistino) de Mori Ogai, "Gyuniku to bareisho" (Bovaĵo kaj terpomoj) de Kunikida Doppo, "Kabi" (Ŝimo) de Masamune Hakucho. Futabatei korespondis kun kelkaj rusoj kaj poloj. En la biblioteko de Waseda universitato estas konservataj 64 leterojn, kiujn Futabatei ricevis de ili. Iliaj nomoj estas Leontij Podpahh, Bronislav Pilsudski, Fjodor Postnikov, Nemirovich-Danchenko k.a.

Roloj de apartaj personoj, perantoj en la kultura sfero havas sendube gravan signifon. Sed kiel oni povas juĝi laŭ historiaj eventoj la pli supera aŭ eĉ subprema estas diktato de la ŝtatoj en kulturaj rilatoj.

Kontaktoj inter Rusio kaj Japanio en la humanisma sfero estas impresa se oni konsideras ke dum la lasta jarcento la rilatoj inter du landoj estis markitaj per militaj konfliktoj kaj la oficiala propagando de ambaŭ ŝtatoj faris multon por ke inter du popoloj regu malamikeco. Malgraŭ ĉi tio la interŝanĝo de spiritaj valoroj neniam plene ĉesis eĉ en plej malfacilaj tempoj.

La ĵus diritan mi povas alivortigi: malgraŭ la evoluo de kulturaj rilatoj la popoloj de Rusio kaj Japanio plurfoje milite kontraŭstaris unu la alian kaj en tiaj periodoj “imago de malamiko” superis ĉion alian en kapoj de rusoj kaj japanoj.

Rialate Japanion oni povas rememori kian signifon atribuis la japana registaro je kontrolo pri literaturo en krizaj periodoj. Ordonoj de la registaro pri kontrolo super la kulturaj rilatoj kaj literaturo dum militaj jaroj ĉiam aperis tuj post ordonoj pri mastruma milita mobilizo. Ĉiuj manieroj kaj metodoj estis aplikataj de la registaro por fari premon super la literaturo kiel spegulo de socia opinio de la japana popolo.

Sed malgraŭ tiaj politikaj premoj la studoj pri Rusio, la rusa lingvo kaj la kulturo ĉiam iris antaŭen. Nuntempe rusaj katedroj ekzistas en ĉefaj universitatoj de Japanio: Tokio, Waseda, Hosei, Hitotsubashi, Doshisha, Sofia, Ritsumeikan, Osaka gaikokugo, Hokkaido daigaku. Tiel fakuloj pri la rusa kulturo en Japanio ĉiam kompletiĝas, oni plu tradukas novajn rusajn aŭtorojn kaj sinteno de japanoj rilate la rusan kulturon plu estas estimplena.